

LA VESPA PIKNIKO

Ni kunvenis malvirtuale!

ESPERANTO EN MARCHÉ

PROGRAMLIBRETO DE LA KONGRESO



Revue trimestrielle belge

AUTOMNE 2021 - N°3

ni faris

VESPA PIKNIKO, LA SEMO

ni faras

BENELUKSA KONGRESO

ni faros

KURSO POR PROGRESANTOJ

Informations Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La **V.Esp-o** (Valona Esperanto-Asocio/Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de

Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café. via un don mensuel de 3€ ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



FÉDÉRATION
WALLONIE-BRUXELLES

Devenir membre / Membroĝi

MEM (membre > 25 ans + revue) 25 €

JUN (membre < 25 ans + revue) 12 €

FAM (cohabitant pas de revue) 5 €

REV (abonnement revue seule) 12 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie

BE72 0003 2585 3716 avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

www.esperanto-wallonie.be

E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Kristin TYTGAT: 03 322 80 70 kristin.tytgat@skynet.be
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL). 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Contenu / **Enhavo**

LaSemo: - 4/5
Château Grésillon - 6/7
La Vespa Pikniko - 8/9
Programo de la Beneluksa
Kongreso - 10/12
Cahier d'exercices - 13
La ŝanĝo en la enkonduko
de Esperanto - 14
Pri la inundoj - 15
Bestonomoj - 16/17
12 faux anglicismes - 18
Kuniru kun ni - 19

Colofon / **Kolofono**

Ce magazine est édité
par l'asbl Esperanto
Wallonie Rue de la
Terre Franche, 33 -
5310 Longchamps.
Rédacteur en chef :
Jean Annet
Rédaction et mise en
page : Yves Nevelsteen
Impression & envoi :
Jean-Pol Sparenberg



Saluton al ĉiuj

Un numéro un peu spécial que cette édition d'automne puisqu'il constitue aussi le programme du Beneluksa Kongreso que nous organisons à Charleroi et qu'il va donc être distribué à tous les participants. Comme d'habitude vous y verrez ce que nous avons fait ces trois derniers mois, ce que nous faisons — la reprise des cours, le congrès y compris notre assemblée générale — et j'évoque ici brièvement ce que nous ferons, entre autres, c'est à dire notre participation au programme Excel'Langue à Libramont. Il faut savoir que c'est plus de 400 élèves du primaire qui recevront une initiation à l'espéranto en novembre.

Petit à petit, nous nous revoyons, nous reprenons nos cours en présentiel et allons intensifier nos rencontres. Je rappelle que la **V.Esp-o** est là pour vous aider, financer vos projets et, si nécessaire, vous fournir en tout type de matériel dont vous auriez besoin pour la promotion de l'espéranto dans votre région.

N'hésitez pas à nous contacter.

Bonne rentrée.

Jean ANNET

Éditorial **Antaŭvorto**



PREMIER TABLEAU ÉLÉMENTAIRE

Bovinetto = vachette

Bo	Cj	Ui	An	Aj	Ej	Ec	Em	Ig	On	Et
Ge	Nj	In	Est	Ij	Iam	Im	Im	Ig	Obl	Eg
Eks		Id	Ist	Ar	Uj	End	End	End	End	Ac
Pra			Er			End				Um

ressants"
 our substatifs
 our adjectifs

- Suffixes pour verbes
- Suffixes pour nombres
- Suffixes universels
- Suffixes pour participes

Int	Ant	Ont
It	At	Ot

"Premier tableau élémentaire" (Premier Tableau Élémentaire), table alphabétique et syntaxique sans lettres.
Description: Sous le titre "Premier Tableau Élémentaire" de l'œuvre "Premier Tableau Élémentaire" (1888) de Louis de la Roche.



Ni ĉeestis la festivalon LaSemo en Enghien je la 10-11a de julio

De kelkaj jaroj ni partoprenas la festivalon LaSemo (kies titolo estas en Esperanto). Ankaŭ ĉi-jare, malgraŭ la sanitaraj limigoj, ni partoprenis ambaŭ tagojn. Ni estis en la areo nomita « l' Amusoir », kiu estas rezervita por infanoj. Sabate la vetero ne estis tre bona, ni devis adaptiĝi. Partoprenis Yves, Jean-Pol, Bernadette kaj ŝia edzo, Pierre kaj mi. Ĉar ni estis multaj, mi prenis la liberecon iri sekvi prelegon de la kunprezidanto de la Klubo de Romo kaj de Princino Esméralda de Belgio, kiuj ambaŭ forte okupiĝas pri la batalo kontraŭ klimata ŝanĝo. Mi tiam invitis ilin veni al nia budo, kie mi povus paroli kun ili pri Esperanto.

Dimanĉe, partoprenis Eliane, Eric, Ĝeŝo, Catherine kaj mi. La etoso estis pli malstreĉa, la vetero estis bonega. Ni algluis sur la budon la afiŝon kun la 'Unua elementa tabelo'. Pluraj homoj miris pri tiu tabelo kaj venis diskuti kun ni propravole. Dum la du tagoj, ni povis kolekti ĉirkaŭ dek validajn adresojn

de homoj interesitaj pri Esperanto. Inkluzive de du interesitoj pri kurso por komencantoj en Ath ...

Ĉi tio starigas la demandon pri la instruistoj kaj ilia disponeblo iri instrui Esperanton.

Jean ANNET



Château Grésillon

Valère kaj Yves vizitis Esperantokastelon

Pro la kronviruso, mi ne vere planis ferii ĉi-somere. Valère sciigis, ke restas loko en lia aŭto, kaj ke estus bone kune vojaĝi kaj dividi kostojn. Tio konvinkis min kuniri kun li al Francio.

Dum pluraj jaroj okazis Festo, fama renkontiĝo de la franca junularo. Jam delonge ili ne plu organizis ĝin, sed restis la emo revivigi tiun festivalon. Do, malgraŭ la pandemio, Christine Brückner kunlabore kun la Verdaj Skoltoj havis la ideon okazigi ĝin en Kastelo Greziljono, en Baugé, proksime de Nantes (Francio).

Ne estis evidente fari tion. Persone mi pensis, ke la semajno ne okazus kaj lastmomente Christine sendus nuligan mesaĝon. Jam ŝi antaŭanoncis, ke ne okazus Festo, sed Festeto, sen fiksa programo kaj en eta rondo. Ĉar Christine antaŭpagis por la ejo, ŝi persistis, kaj lastmomente aliĝis sufiĉe multe da homoj. Finfine estis sukceso!

Mi neniam estis en kastelo Greziljono, delonge mi volis viziti ĝin. Mi aŭdis onidirojn, ke temas pri tre malnova kastelo kiu estus en malbona stato. Ĝi tamen estis en tre akceptebla stato! La kastelon kune posedas

300 esperantistoj; ĝi estas aĉetita jam en 1952. Dum pasintaj dek jaroj estis bona kunlaboro en la estraro de la asocio kiu gvidas la laborojn kaj estras la kastelon. Okazis multaj renovigoj, ekzemple instaligis nova tegmento sur la kromdomo. Aktivuloj Stonĉjo kaj Berto rakontis, ke tion eblis fari dank' al eksteraj enspezoj, de homoj kiuj organizas geedziĝajn festojn kaj aliajn festojn en la kastelo. Pli kaj pli oni sukcesas ludoni la ejon semajnfine al eksteruloj kaj nun ili provas ankaŭ ludoni ĝin dum- semajne, eĉ. Tiucele estis dum la semajno de Festeto du junaj staĝantoj kiuj volas helpi por surmerkati la kastelon. Ili refaris la kontakton kun la loka turisma agentejo. Mi konstatis ankaŭ, kiam ni vizitis la kastelon de Baugé en la urbocentron, ke estis faldfolio tie pri Greziljono. Eĉ iu kreis filmeton per flugroboto! **www.mallonge.net/kastelofilmo**. Ĝi donas tre bonan kaj modernan impreson. Ankaŭ oni kreis novan retejon speciale por la luado al individuoj kaj asocioj ne-Esperantaj.

Regis tie tre pozitiva etoso, kaj mi rimarkas ke tiu teamo vere volas plibonigi la kastelon dum la venontaj jaroj kaj esperas havi pli kaj pli da enspezoj kaj povi proponi pli

bonkvalitan ejon. La fenestroj datas ekzemple ankoraŭ de antaŭ tre longe; kaj estas unutavolaj. Apenaŭ eblas tial uzi la kastelon dum vintro; hejti ĝin estus tro koste.

Kiam mi alvenis, mi miris, ke estis pluraj junuloj inter ni. Estis junulo Camille, kiu sukcesis konvinki sian kunloĝantinon, kuniri al Greziljono. Mi pensis, ke tio malhelpus por la etoso – eble oni pli krokodilus – ĉar ŝi estas komencanto, sed dum la tuta semajno oni apenaŭ krokodilis. Tiu kunloĝantino Mathilde studis la grekan kaj latinan kaj parolis Esperanton sufiĉe flue! – eĉ se estis vere ŝia unua renkontiĝo.

Ankaŭ sendube helpis – « malkrokodiligis » – la tuton, ke Christine kaj Lars ĉeforganizis la eventon. Ili samkiel Gunther kaj Dorle estas germanoj kiuj ne regas la francan. Estis sufiĉe internacia kaj vere Esperanta renkontiĝo.

Mi iom antaŭtimis, ke mi tediĝus dum la semajno, ĉar estis malmulte da partoprenantoj – ni estis nur ĉ. 15 – kaj la programo estis tute ne klara; ni kune kreu ĝin. Tio ne ĉiam same bone funkcias... Sed! Evidentiĝis, ke ĉeestis kelkaj tre talentaj kaj kreemaj homoj. Mi aparte ĝojis pro la tute ne atendita teatra ateliero, kiun donis Camille Berger. Li studas tion; li neniam gvidis tian atelieron antaŭe, sed li faris tion mirinde profesie. Ne vere temis pri teatrumado mem, sed pri preparado al ĝi. Li faris ekzercojn por senti sian korpon, ni dancis kun fermitaj

okuloj, faris ekzercojn pri spirado kaj similaj aferoj. Pensigis min pri tajĝiĉuano. Resume, por mi vere estis malstresiga semajno. Ni faris tion ĉiutage matene kaj posttagmeze ni ripozis. En iu momento aperis la ideo viziti la kastelon de Baugé, kaj ni do faris tion. Tiu kastelo estis multe pli granda, moderna kaj alloga ol mi antaŭvidis. Ŝajne iam en la 15a jarcento batalis francoj kaj angloj en Baugé. Skotoj venis por helpi, kaj Baugé ludis en tio vere centran rolon. Tre grava historio, kiun oni vere bone prezentis, interalie per moderna aŭdovida spektaklo.

Mirigis min ke, kvankam ni estis nur malmultope, venis du profesiaj kantistoj al Festeto. Venis Polyanna, amikino de Christine kiu kantas angle. Ŝi bonege kantis kaj estis tre etosplena. Dum alia vespero venis Jomo por koncerti kaj por kunkantigi nin. Jomo estis survoje al alia renkontiĝo, Pluezec, kaj do povis kombini ambaŭ. Mi ĝojas, ke li pretas koncerti por malgranda publiko.

Estus bone, se pli da esperantistoj malkovrus la kastelon Greziljono kaj organizus renkontiĝojn tie. Estas multaj eblecoj, kaj ne estas tre for de Belgio!

Yves NEVELSTEEN

www.gresillon.org/eo

Le picnic d'Espéranto Wallonie



La Vespa Pikniko

La 5an de septembro okazis la unua « vespa » (de la 'Valona Esperanto-asocio') pikniko.

Dank' al niaj afablaj gastigantoj, Jean Annet kaj lia edzino Isabelle, dudeko da esperantistoj festeme kunestadis en ilia bela ĝardeno. La ĉielo bluis kaj la frandinda bufedo abundis.

Ĉeestis krom valonoj ankaŭ Kristin de la Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj Nicky, la prezidanto de la Flandra Esperanto-Ligo. Ni revidis ankaŭ kelkajn « malnovulojn ».

La etoso estis tute plaĉa, bonhumoriga des pli ke dum tiuj longaj antaŭaj apartaj monatoj ni diversgrade travivis solecon. Do tiu kunesta posttagmezo varmigis ĉies koron.

Plej multaj partoprenantoj venos al Charleroi, al la Beneluksa Kongreso fine de septembro. Estos plia okazo por denove renkonti konatulojn kaj novulojn ĉeeste.

Ja ni ĉiuj spertis, ke la virtualaj renkontoj tutcerte havas gravajn avantaĝojn, sed tamen ni sentas ke la realaj renkontiĝoj ankaŭ...

Alidirite la nuna mondo kiu apartigas homojn paradokse redonas sencon, valoron al la homa renkonto.

Post tiu sukcesa vespa pikniko mi havas nur unu sugeston por venontjare: ni parolu en Esperanto, ĉar niaj flandraj amikoj estas bonvenaj. Ni povos aldoni unu « francan tablon » por la valonaj tutnovuloj.

Catherine ROYAUX



Programo de la Beneluksa Kongreso

Ĵaŭdo

11:00 (ekde) akcepto. Ni rajtas lasi valizon en la gastejo.

12:30 tagmanĝo en la gastejo

14:00 trankvila ekskurso en la urbo Charleroi mem.
Piedpromenado tra la centro de la urbo.

Alternativa programo por ne-ekskursemluloj:

- Teknika helpo: individua helpado fare de Yves.
Ekzemple: ĉapelitaj literoj, vortaroj, literumilo.
- Paroliga rondo gvidata de Piet Glorieux

18:30 vespermanĝo en la gastejo

20:00 biergustumado (Valère). Por homoj kiuj ŝatas malkovri strangajn bierojn. Ni gustumos 6 eksterordinarajn bierojn. Mi certe surprizos vin! (eta krompago)

20:00 (aŭ poste) Filmo

Vendredo

07:00-10:00 matenmanĝa bufedo

07:30 meditado gvidata de Jean Annet

10:00 ĝenerala asembleo de la Valona Esperanto-Asocio

10:00 laborkunsido pri la estonteco de la FEL

10:00 kurso por komencantoj fare de Fransuaz

12:30 tagmanĝo

14:00 kunsido de Belga Esperanto-Federacio

14:00 filmo por tiuj kiuj ne volas kunsidi

16:00 kantateliere kun Ankie kaj Nanne de Kajto



17:30 prezento de Fonduso Instigo fare de Yves: kiel efike finance subteni la projektojn Eventa Servo, Komputeko, esperantigo de programoj kaj retejoj ktp? www.instigo.be



Programo de la Beneluksa Kongreso

18:30 vespermanĝo

20:00 arta vespero kun la fama frisa duopo Kajto! La repertuaro de Kajto konsistas el vigla popolmuziko, maristaj kantoj, kanonoj kaj popoldancoj. Kajto kantas ĉefe en Esperanto sed ankaŭ nederlande, frise kaj en aliaj lingvoj. Dum la koncertoj la grupo invitas la publikon al kunkantado. Legu pri Kajto en Vikipedio: **www.mallonge.net/kajto**

22:00 Lode prezentas sian ludon La Granda Vojaĝo, sekvata de ludvespero (en la trinkejo).

Sabato

07:00-10:00 matenmanĝa bufedo

07:30 meditado gvidata de Jean Annet

10:00 libroservo

10:00 kurso por progresantoj fare de Alex Humet

10:00 kurso por komencantoj fare de Fransuaz

10:00 paroliga rondo gvidata de Piet Glorieux

11:00 prelego de Yves pri oftaj eraroj en Esperanto

12:30 tagmanĝo

14:00 grupa ekskurso al la tre vizitinda ŝiplifto de Strepv-Thieu. Ni mendis buson por 40 personoj. Ne estas krompago por la transporto aŭ la eniro; ĉio estas inkluziva! Eksciu pli pri la ŝiplifto en Vikipedio:

www.mallonge.net/lifto

14:00 alternativa programo por la ne-ekskursemluloj



Programo de la Beneluksa Kongreso

18:30 vespermanĝo

19:30 biergustumado (Valère Doumont): ni gustumos 5 malsamajn bierojn el 5 malsamaj belgaj stiloj (gueuze/lambic, belga IPA, triple, bruna, kristnaska/vintra). (eta krompago)



20:30 Kvizo sen vizo, prezentata de Klaas Dijkstra. La kvizo vin direktos al ĉiuj anguloj de la terglobo, kaj eĉ ekster tio. Per demandoj tekstaj, aŭskultendaj kaj laŭvidaj, la partoprenantoj faros virtualan vojaĝon, kiu ne eblis en la pasinta jaro: kien nun?

22:00 Ludvespero: La Granda Vojaĝo, skrablo kaj aliaj tabloludoj (en la trinkejo).

Dimanĉo

07:00-10:00 matenmanĝa bufedo

07:30 meditado gvidata de Jean Annet

10:00 libroservo

10:00 prelego de Jean Annet pri la traduko de la Urantia libro al Esperanto kaj prezento de ĉi tiu libro.

10:00 kurso por progresantoj fare de Alex

10:00 kurso por komencantoj fare de Fransuaz

11:00 prezento de Klaus Leith de la UEA/EEU-kampanjon pri la eŭropunia « Konferenco pri la estonteco de Eŭropo ». Prezento de ĉirkaŭ 45 minutoj, laŭeble kun aldonata tempo por posta diskuto.

12:30 tagmanĝo

14:00 promenado por la malfruaj forirantoj (Valère: sporta/urba esplorado sur la ŝutmontoj)


14:00 vizito al la ekspozicio Têtes de l'art- Rockerill Résident **www.tetesdelart.org**

14:00 libera vizito al la fotomuzeo en Mont sur Marchienne, 5 km sude al la stacidomo. Ĝi enhavas 2.200 m² da daŭra fotoekspozicio kaj kelkajn provizorajn ekspoziciojn. Se vi intencas viziti ĝin, indas antaŭmendi lokon per la retejo www.museephoto.be.

Aktualigata programo: **www.mallonge.net/bk2021**

Cahier d'exercices Assimil

160 ekzercoj por plibonigi vian Esperanton



Akiru vian ekzempleron ĉe la libroservo de la Beneluksa Kongreso!

C'est le grand retour de l'espéranto au catalogue des célèbres éditions Assimil ! En effet, après avoir commis 4 jeux de société sur les langues chez Assimil (dont un jeu de 7 familles « FamiliLinguo » où l'espéranto était déjà présent parmi les langues proposées), j'ai rédigé un *Cahier d'exercices d'Espéranto pour débutants* qui vient de sortir en librairies.

Si vous ne connaissez pas encore la collection des cahiers d'exercices d'Assimil et/ou que vous n'avez pas encore appris l'espéranto, ne vous en faites pas : ce ne sont pas des exercices qui nécessitent des connaissances préalables de la langue (même si les faux-débutants peuvent s'en servir pour réviser leurs connaissances), mais c'est bel et bien une vraie méthode émaillée d'exos ludiques et colorés qui vous mène pas à pas vers un apprentissage de la langue en s'amusant. 168 exercices originaux et progressifs vous attendent, ainsi qu'un résumé grammatical et un jeu à découper en annexe, le tout pour moins de 10 euros. Alors, si vous avez des connaissances dans votre entourage qui veulent se mettre à l'apprentissage de l'espéranto, ou si vous voulez réviser la langue d'une manière ludique, n'hésitez pas à faire passer le mot car ce cahier d'exercice est facile à se procurer.

Henri DE SABATES

La ŝanĝo en la enkonduko de EO

Ĉiutage, ni aŭdas, ke la mondo ŝanĝiĝas ĉiam pli rapide kaj la ŝanĝoj timigas multajn homojn. Multaj diras « estis pli bone antaŭe » (laŭ libro de Michel Serres) kaj volus, ke la mondo ne ŝanĝiĝu. Sed ĉu tio estas vera? Klare ne! Sed kiel koncepti la ŝanĝon ? Laŭ la usona psikologiisto kaj sociologiisto Paul Watzlawick oni povas distingi du nivelojn de ŝanĝo : la ŝanĝon de la realo kaj tiun de la percepto. Ĉiu vera ŝanĝo estas duobla. Do, la kreemo estas la kapablo ŝanĝi la percepton de aferoj (Luc De Brabandere kaj Anne Mikolajczak). Dum la fino de la 19a jarcento, kiam L. L. Zamenhof kreis Esperanton, kiun li nomis internacia lingvo, li perceptis alie sian plurkulturan ĉirkaŭaĵon. Li perceptis alie la rilatojn inter la malsamaj kolektivoj en Bjalistoko. Se ni prenis la tempon malkovri, iniciĝi kaj profundigi en Esperanton, tiel ni admirus ĝian belecon kaj la talenton de Zamenhof.

Sed kial tiu internacia lingvo ne disvastiĝas al ĉiuj mondcivitanoj? Kial la realo de la mondo ne estas malsama post la kreado de Esperanto? Ŝanĝi estas reformi malmulte aŭ multe la societon sed « la novaĵo havas kiel malamikojn tiujn, kiuj prosperis en la pasinta etoso kaj havas kiel varmetajn porbatalantojn tiujn, kiuj povus prosperi en la nova situacio » (Machiavel – La Princo). Nuntempe, tra la mondo, la komputiloj interkomunikas rete multajn datenojn uzante komunan lingvon ankaŭ kreitan. Kompreneble,

estas ekonomia intereso!

Lingvo ne nur estas ilo por komuniki. Lingvo estas nia kultura identeco. Ĝi forĝas la manieron vidi la realon de la mondo kaj pripensi ĝin. La Esperanta movado ne volas la hegemonion de iu ajn lingvo en la tuta mondo. Esperanto estas lingva ponto inter homoj el malsamaj kulturoj. Atentu, Esperanto estas ankaŭ riĉa je specifa kulturo post jam unu jarcento! La filologiistino kaj filozofino Barbara Cassin (*1947) estas konvinkita ke « la vortoj havas la povon realigi la aferojn. La lingvaĵo, diskurso kaj retoriko, estigas la aferojn kaj ĝi konstruas la realon. » Tiam sen la volo de politikistoj kaj oficialaj institucioj, ĉu Esperanto disvastiĝos grave tra la mondo? La homaro estas nuntempe interkonektata per interreto. Estas multaj kvalitaj iloj por memlerni la lingvon per interreto. Plie, defioj de la homaro estas tutmondaj. Tiuj bezonas tutmondajn debatojn per lingvo kiel Esperanto ĉar el la veraj debatoj naskiĝas la solvoj. Sed, la motivo por ke ĉiu homo lernu tiun belan lingvon estas kerna kaj tiel povi ŝanĝi grave la realon de la mondo (dua nivelo de la ŝanĝo). La filozofo Henri Bergson diris ke : « la estonteco ne estos tio, kio okazos sed tio, kion ni faros ». Tio, kio okazas al ni estas parte la rezulto el niaj elektoj. La estonteca mondo estas unue tiu, kiun ni elpensas kaj realigas. Kaj vi, kion vi pensas ?

Pierre SIMON

Les inondations en Wallonie

Mia rakonto pri la inundoj

Marde la 13-an de julio 2021, antaŭ noktomeze pluvis tiel laŭte ke mi vekigis pro la frakasa bru sur la tegmento, aldonita al la surda muĝo de la roĝo antaŭ la domo, ĝenerale sekigita kaj do silenta. Subite torento trapasinte la najbaran naĝejon sternis la ĉirkaŭajn ĝardenojn kaj fluis en miajn tri kelojn. Timante ke la akvo pli altiĝas, mi transportis supren nutraĵojn kaj elektrajn aparatojn. Nenio estis por fari, nur akcepti tiun fenomenon kiu kaŭzis tiom da damaĝoj en la kvartalo. Dum kelkaj tagoj sen fluanta akvo, elektro kaj interreto, la vivo ŝajnis halti. Por kontroli angoron kaj pli facile akcepti la truditan senmovecon, mi plenigis vortlibreton kun krucvortenigmoj paĝon post paĝo, dum mi konstante kontrolis la akvonivelon. Bonŝance ĝi ne atingis la teretaĝon; mi estis savita! La tempo por agi venis post tri tagoj, sed kia koŝmara vidaĵo en la tuta regiono! Mi eskapis de la terura detruo. Nur la apogmuroj sen cementaj artikoj atestos ĉi tiun katastrofon kaj miaflanke mi ne forgesos la senton de dankemo vekita de tia solidareco tra nia lando. Eĉ plej granda malbono al bono kondukas.

Eliane PIRONNET



Origine du nom des animaux

Origino de bestonomoj en Esperanto

Il n'est pas facile pour tout le monde de savoir que la 'mésange' se dit en anglais {tit}, en néerlandais {mees}, en allemand {Meise}, en espagnol {carbonero}, en portugais {abelheiro}, et en russe {sinitsa}. Mais pour les ornithologues du monde entier, il s'agit simplement de [Parus major] où [Parus] est le genre avec une majuscule, et [major] l'espèce. En espéranto, on a 'paruo' et il est probable qu'il s'agit ici d'un emprunt au latin de la classification biologique. Le même problème existe pour le 'renard' qui se traduit en (A : fox, G : Fuchs {G}, Grec : alepou, H : zorro, NL : vos, P : raposa, R : lisa), mais pour tous les zoologues, il s'agit uniquement de [Vulpes], d'où le mot 'vulpo' en espéranto !

Les scientifiques disposent en effet pour classer tous les êtres vivants d'une nomenclature universelle utilisant le latin. Dans le numéro 2_2016 de notre revue «Espéranto en Marche» on peut retrouver l'essentiel de cette taxonomie qui va du Super-règne à l'Espèce: « Super-règne, Règne, Embranchement, Classe, Ordre, Famille, Genre, Espèce, Sous-espèce ». Cet article en espéranto est consultable : <<https://esperanto-wallonie.be/fr/esperanto-en-marche-fr>>.

Profiter complètement de cette classification latine, acceptée internationalement, pour créer des racines en espéranto, aurait été selon moi une décision logique, vu son caractère universel.

Mais Zamenhof, a préféré utiliser pour certains êtres vivants très communs des racines provenant de langues modernes, plutôt que leur équivalent scientifique latin, mis ici entre parenthèses droites [] : Hundo pour le chien [Canis lupus familiaris], kato pour le chat [Felis silvestris], ĉevalo [Equus caballus], porko [Sus], koko [Gallus], ŝafo [Ovis], vesperto [chauve-souris : Chiroptera], fiŝo [poisson : Pisces], birdo [oiseau : Avies], serpento [Ophidio], Même choix pour certains arbres fruitiers : Pomarbo pour le pommier [Malus domestica] (donc plutôt dû au choix de 'pomo' pour le fruit au lieu d'un curieux 'malusofrukto', ce qui peut se comprendre !), ĉerizo [Prunus avium] ('pruno' est une prune !), oranĝarbo [Citrus sinensis], (citron est 'citrono'). Mais poirier = pirarbo est [Pyrus communis] et fraisier est [Fragaria] ('frago' = fraise). Un certain nombre de racines de l'espéranto ressemblent à la fois au français et à l'équivalent latin pour le Genre ou l'espèce: rato [Rattus], krokodilo [Crocodyllus], lupo [Canis lupus],

urso [Ursus], leono [Panther leo], tigo [Panther tigris],

D'autres sont facilement reconnaissable par les francophones, mais proviennent manifestement du latin : kapro [(chèvre) : Capra], cervo [(cerf) : Cervus], kamelo [(chameau) : Camelus], talpo [(taupe) : Talpa], kastoro [Castor], lutro [Lutra], marmoto [Marmota],

Mais il faut bien se rendre à l'évidence, que pour la majorité des animaux, l'origine de la racine espéranto est issue de la classification latine biologique : vulpo [Vulpes], azeno [(âne) : Equus asinus], kuniklo [(lapin) : Lepus cuniculus], anaso [(canard) : Anas], ansero [(oie) : Anser], sciuro [(ecureuil) : Sciurus], erinaco [(hérisson) : Erinaceus], muso [(souris) : Mus], mustelo [(martre) : Mustela], testudo [(tortue):Testudo], rano [(grenouille):Rana], melo [(blaireau) : Meles], heliko [(escargot) : Helix], histriko [(porc-épic) : Hystrix], kapreolo [(chevreuil) : Capreolus capreolus], lacerto [(lézard) : Lacerta], oriole [(loriot): Oriolus oriolus]. Le cas de la racine pour le sanglier est particulier : 'apro' vient bien du latin [aper, aprum], mais ne correspond pas au nom scientifique [Sus scrofa]. Il y a sans doute d'autres cas. On pourrait faire la même analyse pour les oiseaux, les invertébrés, les végétaux.

Personnellement, en tant que naturaliste amateur, je ne peux que regretter que Zamenhof n'ait pas décidé dès le départ de rattacher vraiment l'espéranto à la classification biologique existante. Cela aurait facilité le

choix des racines pour tous les êtres vivants et surtout, aurait augmenté le caractère international de l'espéranto. Mais il est évidemment ici hors de question de modifier le Fundamento et de s'opposer aux choix de Zamenhof, qui peuvent se comprendre et qui ont été acceptés par tous les espérantophones !

Claude GLADY



12 faux anglicismes

liste de mots que l'on croit anglais

Voici quelques faux anglicismes, que l'on entend ici comme des mots français que l'on croit être des emprunts directs à l'anglais, mais qui n'existent pas en anglais sous la même forme ou avec le même sens. Pas si simple que ça, l'anglais !

Faux anglais	Anglais britannique	Anglais des Etats unis
autocar	coach	coach
baskets	training shoes	sneakers
brushing	blow-dry	bow-dry
caddie	trolley	shopping cart
camping	campsite	campground
dressing	wardrobe	closet
klaxonner	to hoot	to honk
parking	car park	parking lot
pressing	dry cleaner's	dry cleaner's
shampooing	shampoo	shampoo
smoking	dinner-jacket	tuxedo
c'est « top »	that's great	that's amazing

En savoir plus sur <https://www.laculturegenerale.com/faux-anglicismes-liste-anglais-francais>

Savez-vous que Claude Glady possède une très importante collection de livres et de revues en espéranto qu'il y a la possibilité de les emprunter ?

Renseignements
cglady@arcadis.be

Rencontres et cours réguliers :

Charleroi

Centre Destrée, rue Fond Boulet
6001 Marcinelle
Pour y participer :
Michèle Villers
michele.villers@hotmail.com

Liège

Rue Belvaux, 189 à 4030 Liège
Pour y participer :
Éric Nemes
ericnemes@gmail.com

Tables de conversation :

Louvain-la-Neuve

Xavier Belin
belinxavier98@gmail.com
Catherine Royaux
cat.royaux@netcourrier.com

Participons ensemble **Kuniru kun ni**

Fransuaz Pellegrin kaj Yves Nivelsteen instruos dum la studosemajnfino de Esperanto Nederland. La sekva studosemajnfino okazos de la 19-a ĝis la 21-a de novembro 2021. Loko: Krikkenaar, Almelo. www.mallonge.net/studosemajnfino

Yves kunorganizos Luminesk', la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio. Aliĝis jam la belgoj Lydia Buyst, Griet Symoens kaj Kiki Tytgat. Ni vojaĝu kune! La evento okazos de la 28-a de decembro 2021 ĝis la 3a de januaro 2022 en Münster/Germanio. www.luminesk.de

Autres personnes ressources

- Contact presse : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Glady 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !

L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots. Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



à emporter !


L'espéranto, c'est dans la poche

découvrez une langue en une semaine



Recevez cette brochure gratuitement !

- via notre site : esperanto-wallonie.be
- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52



6540-dépôt
lobbes
P001014

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbes